

Propono de la esperantistaro al la Unuiĝintaj Nacioj
okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro
Claude Gacond, 85-a radioprelego, 1964.07.15 & 18

Atentu esperantistoj ! Ĉi tie parolas la Svisa Kurtonda Radiostacio pri la propono de la esperantistaro al la Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Jaro de la Internacia Kunlaboro. Vi aŭdas Claude Gacond.

Per sia Rezolucio de la 19-a de decembro 1962 la Ĝenerala Asembleo de Unuiĝintaj Nacioj decidis proklami la jaron 1965-an, pro la 20-a datreveno de la fondiĝo de Unuiĝintaj Nacioj, **Jaro de Internacia Kunlaboro.**

Tiucele estis formita aparta Preparkomitato, kaj la 29-an de marto de la pasinta jaro la Prezidanto de tiu Preparkomitato petis jam la diversajn neregistarajn organizaĵojn, kiuj havas konsultajn rilatojn kun Unuiĝintaj Nacioj aŭ iliaj fakaj organizaĵoj, kiel Unesko, kontribui kiel eble plej multe al efika antaŭenigo de la celoj difinitaj por tiu jaro. La ĉefa ideo aŭ slogano estas, ke « *Internacia Kunlaboro prezentas unu el la plej efikaj rimedoj por dispeli internaciajn tensiojn.* » Kompreneble UEA troviĝis inter la konsultitaj organizaĵoj. Estas normale, ke ĝi tuj akceptis la inviton doni sian helpon al Unuiĝintaj Nacioj en tiu klopodo. Ĝi jam informis pri tiu intenco la Sekretarion de Unuiĝintaj Nacioj la 3-an de majo de la pasinta jaro.

UEA prave opiniis, ke la Jaro de Internacia Kulturo prezentigis ankaŭ kiel vere taŭga okazo por diskonigi la Internacian Lingvon. UEA antaŭvidas duoblan agadon : unuflanke ĝi instigos la esperantistaron plej efike subteni la klopodojn de Unuiĝintaj Nacioj, aliflanke ĝi entreprenos agadon favoran al nia lingvo.

Estus dezirinde, ke la landaj asocioj kaj lokaj grupoj esperantistaj informiĝu por scii, ĉu formiĝis en iliaj respektivaj landoj specialaj komitatoj por la pretigo de tiu granda internacia kampanjo. Ili tiam povus anonci sian kunlaboron. UEA siaflanke publikigos en sia revuo artikolojn pri Unuiĝintaj Nacioj kaj ties fakaj organizaĵoj, muntos por la Universala Kongreso en Tokio ekspozicion sur la slogano **Jaro de Internacia Kunlaboro – Jaro de la Internacia Lingvo.**

Ĉiu esperanta movado devus aranĝi en sia fako ekspozicion aŭ seminarion en kiuj ĝi celus pruvi la urĝon uzi internacian lingvon en la internaciaj medioj.

La kerno de la agado de la esperantistaro estos propono al Unuiĝintaj Nacioj. Por alporti pezon al tiu propono UEA petas la esperantistojn rikolti plej multe da subskriboj da unuopuloj kaj organizaĵoj. Jen la teksto de tiu propono :

Donante plenan apogon al la klopodoj de Unuiĝintaj Nacioj progresigi la kunlaboradon inter la popoloj kun la celo dispeli internaciajn tensiojn kaj firmigi la mondan pacon ; sed profunde konvinkitaj, ke la lingvodiverseco prezentas unu el la plej gravaj obstakloj al plua intensigo kaj vastigo de internacia kooperado sur ĉiuj niveloj ; prenante en konsideron la Rezolucion de la 10-a de decembro 1954 per kiu la Ĝenerala Konferenco de Unesko rekonis « la rezultojn atingitajn per esperanto sur la kampo de internaciaj intelektaj interŝanĝoj kaj por la proksimigo de la popoloj de la mondo », ni nun proponas, ke Unuiĝintaj Nacioj solvu la lingvan problemon per efektiva kaj efika helpo al disvastigo de la neŭtrala Internacia Lingvo Esperanto, rekomdante ankaŭ al la Ŝtatoj-Membroj progresigi ĝian instruadon kaj stimuli ĝian uzon en la internaciaj rilatoj de la popoloj.

Paralele al tiu rikoltado de subskriboj UEA ellaboros apartan bone dokumentitan Memorandon, kiun ĝi transdonos en konvena momento al la Sekretario de Unuiĝintaj Nacioj kaj al ĉiuj Ŝtatoj-Membroj. CED eldonos specialan dokumenton, en kiu estos koncize prezentitaj la ĝisnunaj atingoj de nia lingvo. UEA intensigos la klopodojn por vastigo de la instruado de esperanto en la lernejoj. Fine, ekster kiu ajn oficiala kadro de la Movado, estos

Propono de la esperantistaro al la Unuiĝintaj Nacioj

okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro

Claude Gacond, 85-a radioprelego, 1964.07.15 & 18

entreprenitaj la necesaj paŝoj, por ke kiel eble plej multe da kvalifikitaj personoj kandidatigu UEA-n al la Nobel-Pacpremio en 1965.

Kvankam tiu kampanjo estos oficiale lanĉita nur dum la Universala Kongreso en Hago, tamen necesas ĝin organizi. Ni tuj komencu la prepar-laborojn kaj organizu la kolektadon de subskriboj. Oni memoru, ke unu jaro rapide forpasas kaj ke la propono de la esperantistaro estos prezentita al Unuiĝintaj Nacioj antaŭ la fino de la venonta jaro.

Se ni rigardas malantaŭen, ni konstatas, ke la kolektado de subskriboj por la peticio, kiu permesis al Unesko adopti sian faman Rezolucion, multe antaŭenpuŝis nian aferon. Tiam la esperantistaro devis kontakti plej diversajn personojn : gravuloj, laborkamaradoj, edukistoj kaj ceteruloj tiel konatiĝis ofte por la unua fojo kun nia lingvo kaj nia movado. Multaj el ili, kiam la esperantistaro kapablis konservi la kontakton, fariĝis entuziasmaj simpatiantoj aŭ eĉ iom post iom lernis nian lingvon. Dank'al la iniciativo de UEA kaj al la malfermo de tiu nova kampanjo la esperantistaro devos rekomenci labori por diskonigi sian idealon, estos nova progreso, eble tiu, kiu kondukos al la fina venko, por nia movado. Mi do instigas vin ĉiujn, karaj geaŭdantoj, aktive partopreni tiun novan kampanjon, plenigante proponlistojn per la subskriboj de viaj konatoj kaj laborkolegoj.

Vi aŭdis Radio-Svislandon. Claude Gacond raportis pri la propono de la esperantistaro al Unuiĝintaj Nacioj okaze de la Jaro de Internacia Kunlaboro.

Ĝis reaŭdo !

-oOo-